



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIO HOMA
ESTAS AL NI FREMO

TRA LA MONDO IRAS FORTA
EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO

Kulturaj Kajeroj

E.M.A.M.C. →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 15 fkoj } P. BABIN
Bonfara : 20 fkoj } 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

Julio - Aŭgusto - Septembro - Oktobro

1974

4-5

KULTURAJ KAJEROJ

1974

JULIO - AUGUSTO - SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Homaĝe al rozo

Grekujo, Miceno

Historio de la mono (2)

Aŭtomobile veturi pere de suno

Denaska marŝamanto

Malapero

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

Post la Nacia Kongreso de la fervojistoj, fermiĝis la pordoj de la Kulturdomo ĝis la venonta jaro. Almenaŭ por la vizitantoj ĉar la postsomeraj reordigo, purigado kaj riparado forrabas multe da tempo de la diversaj respondeculoj. Baldaŭ komenciĝos ankaŭ la anstataŭigado de la malbona, malbonstata murteksaĵo de la granda ŝtuparo per nova. Poste du ĉambroj sur la unua etaĝo estos modernigataj. Kaj, almenaŭ provizore, ĉesos la novaj aranĝoj. Ĉar, kvankam la nombro da partoprenantoj estis iom kontentiga, krom dum la Internaciaj Semajnoj, la prezoj de la varoj, la salajroj, la sumoj necesaj por la diversaj riparoj multe altiĝis. Ni mem altiĝis la restadprezojn en 1974. Tio verŝajne ĝenis gesamideanojn, kiuj restadis nur dum unu aŭ du semajnoj anstataŭ tri, aŭ tute ne venis. Sed tiu altiĝo ne estas sufiĉa por fronti la necesajn aŭ planitajn elspezojn. Ĉar ankaŭ la fakturoj de la entreprenistoj « dikiĝis ».

La instalado de la granda salono, kiun ni ne povis daŭrigi rekomenciĝos nur, kiam la Kultura Asocio povos disponigi al ni novan sumon. Dum la someraj periodoj, Fonduso « Salon-seĝoj » alportis 2 000 frankojn, kiuj ebligis la aĉetadon de 20 aŭ 25 sidilojn por la nova salonego. Nur komenco, kompreneble !

Fine de oktobro ni preparos la kalendaron de la diversaj eroj de nia programo por 1975. Unu semajno de la Paskaj ferioj estos dediĉita al renkontiĝo de 9-13 jaraj infanoj el diversaj landoj. Jam dudeko da junaj francoj kaj britoj konigis sian intencon veni aŭ pli precize la instruistoj anoncis, ke ili vojaĝos al Grésillon kun kelkaj el siaj gelnantoj. La programo estos preta en novembro.

Dum la somero verŝajne okazos la kutimaj tri trisemajnaj periodoj kun unusemajna internacia renkontiĝo de fervojistoj, kies dato ankoraŭ ne estas konata kaj duosemajna laborperiodo de la esperantistaj instruistoj de Freinet-movado (dua kaj tria semajnoj de julio).

Kia ajn estos la ĝenerala programo, venu al Grésillon. Tie vi ĝuos etoson, kursojn, prelegojn, pejzaĝon, ekskursojn kaj subtenos la laboron de esperantistoj, kiuj, sen fanfaronado, sen trumpetoj, serioze kvankam kvazaŭ anonime sin dediĉis ne al tiu aŭ tiu ĉi tendenco de la esperanta movado sed al Esperanto, tute simple.

Bonvolu senkulpigi nin...

Ĉi-tiu numero de Kulturaj Kajeroj aperas tre malfrue. Ne la redakcio respondecas pri tio, sed la strikoj en la francaj poŝtoj kiuj malpermesis rilatojn kun la presisto dum unu monato kaj duono. Bonvolu senkulpigi nin pri tiu longega malfruo.

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO DE HAMBURGO

Ĝi arigis 1650 partoprenantojn el 50 landoj. S-ro Helmuth Rohde, federacia ministro pri Scienco kaj Klerigado estis la alta protektanto de la kongreso. Estas notinde ke la kongreslibro entenis interalie saluton de S-ro H. Schmidt, kanceliero, kaj ke oficialaj reprezentantoj el 18 landoj mem salutis dum la inaŭgura kunveno (7 pliaj registaroj sendis skribajn salutojn).

Fine de la festparolado; Prof. I. Lapenna, prezidanto de U.E.A., deklaris ke dum la kongreso, li diriĝos el ĉiuj siaj funkcioj.

Inter la eroj de la programo, ni menciuj la debaton pri « landaj gazetoj en Esperanto — ĉu utilaj? », laborkunsidon pri « kion fari kontraŭ perdo de membroj? », ĝeneralan kunvenon pri « naciismo kaj internacia kunlaborado », tridekon da kunvenoj de diversaj fakaj asocioj, dek unu universitatajn lekcionojn de la somera universitato, belartan kaj oratoran konkurson, kongreseton de infanoj, kongreson de blinduloj, diservojn (unu ekumena), teatron vesperon kun « la barbiro de Sevilla » de Beaumarchais prezentitan de bulgara trupo, varie-teajn vesperojn, balon, ekskursojn, k.t.p....

La komitato de Universala Esperanto-Asocio elektis kiel novan prezidanton, Prof. Humphrey Tonkin (35 jara brito), diplomito en la universitatoj de Cambridge kaj Harvard, help-profesoro ĉe la universitato de Pensilvanio. Li estas eks-prezidanto de Tutmonda Esperanta Junulara Organizo.

La fina rezolucio de la kongreso, interalie, « esprimas sian plenan apogon al la planitaj agadoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj U.N.E.S.K.O. por la jardeko de aktivado por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion ».

La kongreso 1975 okazos en Kopenhago.

LA KONGRESO DE T.E.J.O.

260 junaj geesperantistoj el 31 landoj ĉeestis la kongreson de T.E.J.O., en Münster (3-10 de Aŭgusto).

La temo de la kongreso estis: « Junularo kaj edukado ».

Samtempe okazis seminario por ne esperantistoj titolita « lingvo kaj socio ».

LA S.A.T. - KONGRESO EN BERGAMO

Ĝi okazis de la 3a ĝis la 9a de Aŭgusto 1974 kaj kunigis 330 partoprenantojn el 21 landoj. Tiu kongreso havis tute eksterordinaran eksteran efikon: okazis speciala renkonto por la lokaj sindikatoj en Bergamo kaj Komo. Krome dum tiu kongreso, estis refondita de Socialista Frakcio en S.A.T.

La kongresdomo estis tre taŭga loko kie la kongresanoj sentis sin absolute hejme dank'al la fakto ke sur tiu sama loko oni povis manĝi, dormi, kaj labori.

La diversaj prelegoj havis plej diversajn temojn: pri fungoj, pri la vivo de Lanti, pri sennacieco en skribo kaj geografio. Okazis ankaŭ kelkaj distraj vesperoj kaj tri ekskursoj al Iseo-lago, al kuracloko San Pellegrino Terme, al Komo-lago.

La S.A.T.-kongreso de 1975 okazos en Hago (Nederlando) de la 25 de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto.

RENKONTIĜO DE EKSPERIMENTAJ LERNEJOJ

La trijara eksperimenta instruado de Esperanto en elementaj lernejoj en kvin landoj (Aŭstrujo, Bulg-

rio, Hungario, Italujo, Jugoslavio) finiĝis per komuna aranĝo, Internacia Tendara Lernejo (I.T.L.) en Primošten (Jugoslavio) de la 25a de Junio ĝis la 3a de Julio. Ĉeestis kune kun siaj instruistoj kaj gvidantoj, 85 gelernantoj: la renkonto estis plene sukcesa.

LA BRITA PARLAMENTA GRUPO POR ESPERANTO

La brita grupo de parlamentanoj kiuj subtenas Esperanton havas nun 46 membrojn el kiuj unu (Lord Davis, el Leek) estas ano de la Supera Ĉambro.

HAVEBLA BROŝURO PRI AŬSTRALIO

La aŭstralia ambasadoro en Bonn, eldonis en Internacia Lingvo, tre interesan broŝuron: « Aŭstralia, koncizaj faktoj ».

Vi povas tute senpage ricevi kvanteton de tiu broŝuro por la membroj de via esperanto-societo.

Skribu al la ambasado de Aŭstralia en via lando kaj petu ĝin (kompreneble skribu nacilingve).

NOVAJ ELDONAĴOJ

— Disko « Nikolaj Rytjkov, elektitaj eroj ». Enhave kaj teknike, tiu grandformata disko estas tute rekomendinda; la talenta (nun mortinta) rusa esperantista aktoro oferas al ni poemojn kaj rakontojn de siaj « festivaloj ».

— « Esploroj »: nova origina poemaro de Baldur Ragnarsson. Por la amatoroj de moderna poezio.

— « Ĉu vi parolas tendare »? : rektametoda lernolibro por kursoj en labortendaro.

— « Amuzaj dialogoj »: dialogoj kun konversaciaj frazoj, por progresantoj.

ESPERANTA-RUSA VORTARO

Tiu vortaro, eldonita je 40 000 ekzempleroj ĉe eldonejo de la Soveta Enciklopedio, kompletas la vortaron rusan — esperantan antaŭe eldonita. Kiel la unua, tiu vortaro estas la verko de Pr. Bokarev, nun mortinta. La verko estis finverkita de aliaj esperantistaj rusaj lingvistoj.

RENKONTO EN FRANCUJO POR GEJUNULOJ

Junulara Esperantista Franca Organizo (J.E.F.O.) invitas la junajn geesperantistojn al interesa (kaj agrabla) renkonto dum paska libertempo (27.3 - 2.4, 1975) en Mantes-la-Jolie (je 50 km de Parizo).

Temo de la... serioza parto: « Demografia eskplodo ».

Por informoj kaj aliĝoj al tiu internacia renkonto, skribu al: J.E.F.O., 4 bis, rue de la Cerisaie, Paris 75004.

JAPANA ESPERANTO-DELEGACIO EN ĈINIO

Dum Aprilo, delegacio de ok japanaj esperantistoj estis invitita de Ĉina Esperanto-Ligo por dusemajna vizito en Pekino, Sangajo kaj Kantono.

Ni esperu ke tiu vizito estis komenco de pli aktivaj rilatoj kun esperantistoj en Ĉinio.

NOVA ASOCIO EN FILIPINOJ

Nun funkcias Esperanto-Asocio en Manila, ĉekurbo de Filipinoj. Kursoj estas aranĝitaj. Adreso: Esperanto-Ligo, P.O. Box 2093, Manila, Filipinoj.

HOMAGĜE AL ROZO

Ĉiutempe, en ĉiuj lingvoj, sub ĉiuj klimatoj, la poetoj, la verkistoj, la artistoj, kantistoj Rozon.

La plej bela inter ĉiuj floroj, ĝi naskas admiron, respekton, amon ; ĝi simbolas la inan graciecon.

Louise de Vilmorin nomis ĝin « Mesaĝistino de la neniam esprimitaj eternoj, ĝi portas niajn konfesojn al la koroj, kiujn ni deziras emocii ».

Laŭlonge de la pasintaj jarcentoj, la brileco de ĝiaj koloroj, la dolĉeco de ĝia parfumo eterne ĉarmis la homojn ; multnombraj estas la mesaĝoj, kiuj elvokis la ĉeeston de Rozo, ĉie en la mondo.

Plej antikva homaĝo al Rozo figuras sur moneroj, kiujn oni trovis en tre malnovaj tomboj. Kaj ankaŭ en tre malnova skribaĵo, datumita je 2350 antaŭ Kristo. Tiu teksto rilatas pri ekspedicio de Sargon, la unua reĝo d'Akkad, en antikva Babilonio. El tiu ekspedicio li kunportis « viton, figarbojn kaj rozujojn ».

Rhodes, « la insulo de la rozoj » estas tero, sur kiu ĉio abundas ; sovaĝaj arboj kaj grapoloj da rozoj kovras ĝian kamparon. Estas tiuj rozoj (Rhodon), kiuj donis sian nomon al la insulo kaj ornamas ĝian blazonon.

En Eŭropo, en 1600 ant : Kristo, la palaco de Minos, reĝo de Kreto, entenis freskojn kaj potojn ; ambaŭ montris rozojn. Herodote raportas pri la rozejoj de reĝo Midas, en Phrygie, (proksimume la nuna Turkio). Ili estas luksegaj kaj la tieaj rozoj havis 60 petalojn.

En Antikveco, Paestum, sude de Salerno (Italio), estis vasta rozejo. La tiutempaj skribaĵoj asertas, ke, sur la Paestum-ebenaĵo, la rozoj anstataŭis la tritikon. En sia Georgiko, Virgilo kantas « la rozejoj de Paestum, kiuj dufoje floras ».

De tiam oni pli bone faris. Nune la rozo estas floro, kiu refloras seninterrompe de la komenco de junio ĝis la unuaj frostoj.

En la unuaj jarcentoj de nia erao, la rozo estis tiel diskonita, ke, en la antikva Romo, oni ĝin festis en majo aŭ junio. Oni eĉ diras, ke, en tiu ĉi tempo, la roz-esenco

kostis 6-foje pli ol oro. Imperiestro Nerono estus proponinta union da oro kontraŭ 200 000 rozoj, kiujn oni senfoliigis okaze de festo, kiun li volis plej grandioza.

Hodiaŭ la rozo floras sub ĉiuj latitudoj, en ĉiuj urboj, en ĉiuj vilaĝoj.

Kiom malmulte kostas roz-plantaĵo kompare kun sia grandaĝeco ! Jen rozarbeto, centjara ; ĝia malnova ligno, centfoje pritondita, ĝiaj viglaj tigoj ankoraŭ ornamiĝas je plej elegantaj floroj. Orkapo-Parko en Liono havas unu el la plej belaj rozejoj : 53 000 rozujoj el ĉiuj varioj, el ĉiuj originoj ; ili donas unu milionon da rozoj ; Kia eksterordinara palestro !

Sinjoro Souzy, Prezidanto de Franca Societo pri Rozoj, dezirante ankoraŭ pli honorigi tiun mirindan floron, kuraĝigis kreadon de Roz-Vilaĝoj.

Estas 2 en Germanio, unu en USONO (Wild-Rose), 2 en Francujo : Bellegarde-en-Loiret kaj Saint-Sorlin-en-Bugey.

Saint-Sorlin estas tre malnova vilaĝo ; kun siaj malnovaj ŝtonoj, laŭlonge de la jaroj patinitaj, kun siaj defluoj kurantaj al centra stratdefluilo, ĝi tute konvenas al flora dekoracio.

Ŝajnas, ke tiuj sarmendonaj rozujoj kaj iliaj mil floroj, radiantaj je ruĝo, kiuj orlas la suprenirantan vojon ĝis la preĝejo kaj grimpas laŭ la fasadoj, de ĉiam estas ĉi tie, tiel nature ili harmonias kun la pejzaĝo, kun la ĉirkaŭanta arkitekturo, kun la ĉirkaŭantaj domoj ; unu el tiuj ĉi, kiu datumas je la 16-a jarcento, montras pentritan freskon. La konstruantoj uzis ĉi tie la lokan ŝtonon de Villebois, kiu estas fama pro siaj rozkoloraj tonoj.

Antaŭ 4 jaroj, 9 000 rozujoj el pli ol 100 varioj ; arbataj, grimpaĵoj, « polyanthas » (multfloraj) el ĉiuj koloroj, estis plantitaj por atingi la mirigan floradon, kiu donas hodiaŭ al la vilaĝo, en tiu triumfa junio, luksegan ornamaĵon. En ĉiuj disponeblaj spacoj : ĉe pordo-angulo, ĉe randoj de fosajoj, sur anonimaj ter-benjoj, sur privataj terasoj, en pendigitaj ĝardenoj, sur la voj-flankoj, ĉe la enirejo kaj la elirejo de la vilaĝo, koloraj masivoj starigas siajn odorantajn florojn.



GRIEKUJO — MICENO

Jen Grekujo, kiu etendiĝas de nordo ĝis sudo inter la Iona Maro kaj la Egea Maro; ĝia reliefo estas malglatega; la montoj izolas ebenaĵojn kaj valojn, kaj klarigas, laŭlonge de la Antikvaj Tempoj, la ĉefecon de unu urbo aŭ de alia (Miceno, Delfo, Sparto, Tebo, Ateno). Precipe en la sudo la maro eniĝas profunde en la terojn.

En la neolitiko ekzistis en Grekujo popoloj, kiujn oni malbone konas. Ili estis malnomadaj kaj agrokulturantaj en Tesalio, sed pli metiistaj kaj artistaj en Beotio. En la nordo de la duoninsulo estis ankoraŭ la tekniko de la polurita ŝtono, dum en sudo oni jam konis la bronzon dank'al al najbareco de la insulo Kreto kaj de la Malgranda Azio.

La indo-eŭropaj invadoj venis de la Balkana duoninsulo, laŭsekvis Danubon, instaligis en Epiro kaj celis atingi pli sude la riĉajn terojn, la sunumitajn regionojn kaj la maron. La paŝtistaj hordoj puŝis antaŭ si siajn brutarojn (ŝafojn, porkojn, ĉevalojn). La sinsekvaj ondoj de invadantoj alportis novan vivon al la senmovaj tieaj popoloj. La plej forta ondo estis tiu de la Akajanoj (2000 J. ant. K.). Ili instaligis en sudo, apud la maro. Poste venis la Ionianoj kaj la Eolianoj, kiuj okupis la centron de Grekujo. Oni praktikis la rabadon de la virinoj en la najbaraj valoj; oni rabis ankaŭ la ŝtonajn armilojn kaj la uzilojn aŭ oni ilin havigis al si per interŝanĝoj precipe sur la marbordoj kun la kontraŭbordaj landoj. La virinoj teksis aŭ plektis ĉion, kiu povis servi por protekti aŭ ornami la korpon. En la valoj, en la maldensejoj staris vilaĝoj el rondaj kabanoj kovritaj per vepraĵoj aŭ kanoj. Jam kelkaj tiuj domoj estis kvadrataj; oni ilin nomis la « megaron ». Oni sciis kultivi cerealojn. Estis la paŝtista Grekujo kun siaj klanaj kaj triboj.

Miceno kaj ĝia civilizacio estas la ellaboraĵo de la Akajanoj. La heroa Micena periodo finiĝis du generaciojn post la Trojomilito. Poste venis la Dorianoj, kiuj detruis la Micenan civilizacion; eĉ skribado malaperis.

MICENO

La Micena regiono estis jam loĝata dum la neolitiko, kiam la Akajanoj alvenis (2000 ant K.) ili igis Micenon Centro de la Potenco kaj de la Kulturo.

LA ATREIDOJ, MALBENITA FAMILIO

Laŭ la legendo, Perse-o estis filo de Zeŭs-o kaj Dana-a, kaj fondinto de Miceno. Liaj posteuloj reĝis dum 3 generacioj; la lasta estis Eŭristeo, la onklo de Heraklo, kiun li malamis kaj al kiu, helpe de Hera kaj de ŝia edzo Zeŭso, li trudis la 12 laborojn. La sekvanta dinastio estis tiu de Pelops-o, de lia filo Atreo, de liaj nepoj Agamemnon-o kaj Menela-o, la du fratoj. La Pelopidoj estis samtempuloj de la 18-a egipta dinastio.

LA LEGENDO DE PELOPS KAJ OENOMAO


Oenomaos estis reĝo de Pise, apud Olimpio, kaj patro de Hipodamia; laŭ la orakolo li devis morti de la mano de lia bofilo; al la svaŝtigantoj li trudis la ĉar - kuradon, kiun li ĉiufoje gajnis dank' al siaj ĉevaloj, donacitaj de Ares-o. Hipodamia restis kun sia patro. Pelops, ĉefo de la Akajanoj estis filo de Tantalo. Li volis edziĝi kun Hipodamia; li subaĉetis la koĉeron de Pelops, Mirtilos, por ke li difektu la ĉar-radon de la reĝo. Oenomaos mortis kaj Pelops mortigis Mirtiloson, por ke li silentu. Antaŭ ol morti Mirtilos malbenis Pelopson kaj liajn posteulojn (Atreo kaj la Atreidoj).

La Atreidoj restis famaj pro siaj krimoj, siaj incestoj, siaj adoltoj, siaj diboĉoj. Kelkajn jarcentojn pli

poste la grekaj tragedio-verkistoj Eskilo, Sofoklo, Eŭripido senmortigis ilin: Agamemnon, Klitemnestra, Egisto, Hermiona, Oresto, Ifigenia.

Tamen la reĝado de la Atreidoj estis ankaŭ tiu de la Grandeco de Miceno (1600-1100 ant. K.). Grandeco kantita de Homero en Iliado. Tiu ĉefverko estis skribita 4 jarcentojn post la Trojomilito dank'al la rakontoj parolaj, kiuj pasis de generacio en generacion. En ĝi Homero elvokas la « Oran Micenon » kaj Agamemnon-on, la nekontesteblan ĉefon de la Akajanoj kontraŭ Trojo. Tiu urbo, en kiu grandskale oni tiam praktikis la komercadon de la stano, estis prifosita de Schliemann; ĉi tie li trovis 3 urbojn supermetitajn. Schliemann, riĉa komercisto germana, estis fervora admiranto de Homero. En 1876 li venis en Micenon, kie li vidis nur la Murojn kaj La Pordon de la leoninoj.

Je ĉiu turno de la vojo, oni esperas malkovri fortreson: sed ĝi ne aperas; la rigardo malkovras



nur interkrutan valon, du montojn grizajn kaj nudajn kaj unu piramidon de flavaj ŝtonoj. Oni malkovras Micenon nur kiam oni subite troviĝas piede de ĝiaj muroj kaj fronte al la Pordo de la leoninoj.

Tre antikva mondo leviĝas el tiuj ruinaĵoj.

Estis aglo-nesto de kiu impetega reĝo observis la Argos-ebenaĵon, la vojon al Korinto kaj la golfeton de Nauplie.

Sed, tiuj Micenanoj, kiom ili estis? certe malmulte nombraj, dissemiĝintaj en kelkaj garnizonoj, kiel Tyrinthe. Tamen ilia renomo transpaŝis la jarcentojn. Nur la doriaj hordoj ilin venkis.

LA PORDO DE LA LEONINOJ

Ambaŭflankaj muroj kondukas al tiu pordo. Ili estas altaj je 12-18 metroj kaj dikaj je 3-8 metroj; enormaj blokoj ilin konstituas. La leoninoj, senkapigitaj, staras ambaŭflanke de simbola sankta piliero, kun la antaŭaj piedegoj sur altaro de Kreta tipo. Ili elvokas Atena-n, mastrino de la sovaĝaj bestoj kaj protektantino de la palaco. Tiu pordo estas giganta konstruaĵo: du monolitaj pilastroj (3,70 m. \times 1,75 \times 0,60) subtenas lintelon el nura ŝtono (4,50 \times 2 m. \times 0,80). La bareliefo de la leoninoj staras sur triangula ŝtono (3,90 \times 3,30 \times 0,70). La pordo el duobla klapo estis el tre peza ligno.

LA REGA PALACO

La reĝa vojo serpentume supreniras ĝis la supro de la akropolo; ĉi tie staris la reĝa Palaco el kiu restas nur kelkaj ŝtupoj kaj spuroj de la koridoro; ŝtuparo el 22 ŝtupoj kondukis al la Granda Korto sur kiu malfermiĝis la Megarono. Ambaŭ servis kiel Akceptejoj. Belaj freskoj ornamis la murojn; kelkaj fragmentoj estas en Ateno. En la centro de la Megarono troviĝis la Ĉambro de la Trono. Oni pensas, ke la dispozicio de la micena palaco inspiris, pli poste, la konstruadon de la greka templo.

SUBTERA CISTERNO certigis la akvon okaze de sieĝo; ĝi estis nutrita de la fondo Persia; kruta ŝtuparo el 101 ŝtupoj, fosita en la roko, profunda je 12 metroj, kondukis al subtera pasejo, pasanta sub la remparoj ĝis la cisterno. Tiu ŝtuparo kaj tiu cisterno estas konsiderataj kiel unu el la plej grandaj teknikaj perfektecoj de la Micenanoj.

LA TOMBOJ malkovritaj de Schliemann en 1876 troviĝas interne de la citadelo. Origine ili estis ekstere de ĝi; sed konstruado de nova remparzono lokis ilin internen. Tiam la Micenanoj ilin ĉirkaŭis per elstaraj slaboj, altaj je 1,50 m. kaj enprofundigitaj en la tero. Tiuj 6 puto-formaj tomboj entenis la restaĵojn de 19 personoj. Ili estis la sankta loko en kiu ripozis la prauloj de la Akajanoj reĝoj. La virinoj havis sur la kapo oran diademon aŭ oran harbendon. La viroj havis sur la vizaĝo maskon el oro kaj orajn platojn sur la brusto. Kelkaj el tiuj maskoj reproduktis plej fidele kiel eble la trajtojn de la mortinto. Ilia rolo estis kaŝi la difektojn okazigitaj de la morto. La mortinto deziris, ke oni rekonu lin en la transmondo, por ke li ricevu la honorojn ŝulditajn al lia rango.

Ekstere de la muroj, la prifosaĵoj faritaj en 1951 elterigis, piede de la akropolo, je 100 metroj de la Pordo de la leoninoj, alian cirklon de tomboj, malpli antikvaj (1700 ant. K.). Tiu cirklon havas diametron 18 metran kaj entenis 28 tombojn. Tiuj reĝaj tomboj estis plenaj je funebraj oferdonoj de tre granda riĉeco: objektoj el oro, arĝento, kupro,

kristalo; ponardoj, lanco-pintoj, orelingoj, fingroringoj, vazoj, ŝtonaj steleoj (hodiaŭ en Ateno).

Pli malproksime oni trovis 8 tombojn surstaritajn per malgranda tumulto. Frakturo sur unu kranio igas pensi, ke ĝi estis la unua kirurga operacio de kranio.

Ŝajnas, ke tiu oro venis el Egiptujo, kie la Akajaj princoj kun siaj militistoj, partoprenis batalojn kontraŭ la invadantoj Hyksos. El Egiptujo la Micenanoj revenis ŝarĝitaj je oro. Ili alportis ankaŭ la kulton de la mortintoj kaj la kutimon meti en la tombojn orajn oferdonojn.

LA TOMBOJ EN ĈAMBROJ estis konstruitaj proksimume inter 1600 kaj 1100 ant. K. Oni ilin fosis en mola roko. Dikaj ŝtonoj blokis la enirejan koridoron, « la dromos ». La mortintaj princoj kaj la funebraj objektoj kuŝis sur la planto.

LA THOLOS-OJ (tholos = rotondo)

La « tholosoj » estas mirindaĵoj de la micena funebra arkitekturo kaj sendube montras ŝanĝon de dinastio. (La Pelopsidoj tiam anstataŭis la Perseidojn). Miceno havas 9 « tholosojn ». La plej konataj estas la tomboj de Egisto, Klitemnestra kaj Agamemnon. Tiuj reĝaj tomboj jam de antaŭ tre longa tempo estis vizitataj kaj priŝtelitaj.

LA TREZORO DE ATREO

(aŭ tombo de Agamemnono)

La « dromos », longa senplafona koridoro, estas 36 m. longa kaj 6 m. larĝa; ĝi estis fosita en la roko kaj la ambaŭflankaj muroj estas kovritaj per enormaj ŝtonblokoj.

La fasado de la funebra ĉambro estas alta je 10 m.; ĝia dekoracio malaperis. La lintelo supre de la pordo estas giganta monolito 9 metrojn longa kaj 120 tunojn peza. La Tholoso havas diametron 14,60 m. kaj alton 13,50 m. La plafono estas kupolo tute simila al tiu de abelujo. La korbelo estas farita el 33 ŝtonringoj; ĝi finiĝas per ronda slabo, kiu formas la volboŝlosilon. Ekstere la supra parto estas kovrita per argila tavolo, kie la herbo kreskas, por certigi likimunecon. La internaĵo estis tute dekoraciita sed restas nenio; malgranda aperturo kondukas al malgranda ĉambro; oni ne scias je kio ĝi servis.

Ŝajnas ke tiuj tomboj estis inspiritaj de la Egiptaj piramidoj.

Oni trovis malmultajn loĝejajn restaĵojn: la domo de la ŝildoj; unu 5-ĉambra domo kun alta teraso; la domo de oleo-vendisto, kiu entenis 30 vazojn kun argilaj stampitaj ŝtopiloj; la domo de la sfinksoj; fragmentoj de freskoj kaj aburaj figuraĵoj.

SKRIBO EN MICENO

En Miceno kaj ankaŭ en Tebo kaj en Kreto la arkeologoj trovis interesajn argilajn tabuletojn. Ili estis kovritaj je surskiboj. La skribo uzita estas nomata « Skribo Linia B »; ĝi konsistas ne en literoj, sed en silaboj. La lingvo estas greka.

La trovitaj dokumentoj estis listoj de objektoj apartenantaj al la Palaco. Ili raportas pri agrokulturo, bredado, metioj, sociaj klasoj, adoritaj diaĵoj, riĉeco de la reĝoj K.T.P.

Estas en la Muzeo de Ateno, ke ni povos admiri la belajn micenajn juvelojn.

HISTORIO DE LA MONO (2)

Apero de la monda devizo. — La konkeroj de Aleksandro de Makedonio (356-323 ant. K.) trudas la Makedonian superregadon sur la tuta civilizata konata mondo. Li kreis la unuan mondan devizon, kiu samvaloris de la Maro Nigra ĝis Egiptujo, de Grekujo ĝis la limoj de Hindujo. Longtempe post la morto de Aleksandro cirkulis la drakmoj kaj la tetradrakmoj, kiuj portis lian refiguraĵon kaj kiuj estis kreitaj dank'al la trezoroj prenitaj ĉe la Persaj reĝoj. De tiu momento, mono prenis la unuan lokon en Ekonomio kaj Politiko. Oni estis devigata krei la unuajn fundamentajn leĝojn de la mona sistemo, kaj precipe tiun, kiu regas la rilaton inter mona amaso kaj kvanto da varoj. Tamen, iom post la morto de Aleksandro, la unuaj signoj de inflacio aperis.

Romo fariĝis monda merkato

En la tempo de Aleksandro, Romo ankoraŭ luktis por trudi sian hegemonion sur la tuta Italia duoninsulo. En la komenco, Romo ankaŭ uzis kuprajn blokojn kaj poste kuprajn gisbrikojn, ambaŭ pezajn, malfacile manipuleblajn kaj ankoraŭ ne stampitajn. La unuaj stampitaj moneroj montris Janus-on kun lia duobla vizaĝo, rigardante samtempe pasintecon kaj estontecon. Oni ankoraŭ ilin pezis, kiam Romo, superreginte la tutan Italion, prenis en Tarento enormajn kvantojn da arĝento.. En 269 ant. K., Romo kreis la denarojn, kiuj portis refiguraĵon de Herkulo kaj de la Roma lupino, nutranta Romuson kaj Romuluson. La Romanoj instalas sian mono-Instituton en la templo de Junon-o, nomis ŝin Moneta kaj atribuis al ŝi pesilon kaj abundo-kornon. Romo gardis arĝentajn monerojn ĝis Cezaro, kiu, dank'al la militakiroj dum la Gallujo-milito, stampis la plej grandan kvanton da or-moneroj, kiun oni vidis en Antikveco. Sur ili li reprezentigis sian refiguraĵon.

La enorma kvanto da arĝento alportita de la konkeroj (Scipiono la Afrikano alportis 60 tunojn da arĝento el Kartago) okazigis ruiniĝon de la denaro; ĉar Ekonomio ne plu povis sorbi tiun grandan kvanton da arĝento, mono pli kaj pli perdis sian valoron. Imperiestro Aŭgusto kreis la aureus-on, or-moneron, kiu valoris 35 arĝentajn denarojn.

Kiam Romo ne plu havis sufiĉe da mono por pagi siajn internajn, eksterajn kaj militistajn elspezojn, ĝi praktikis devaluton de la moneroj. Devaluto, kiu komenciĝis sub Nerono; riĉaj metaloj pli kaj pli malaperis el la monoj, profite al kupro. (75 % da kupro en 235, 95 % en 268). La eksterlandoj (britaj, skandinavaj, germanaj, sudrusaj landoj, Egiptujo, Ĉinio, Afriko) postulis pagojn el oro. La 3/4 de la or-kaj-arĝent-moneroj estis forirantaj eksterlanden. En Romio la bonaj moneroj kaŝiĝis. La prezo de la varoj pli kaj pli altiĝis. Tion vane Diocletien provis haltigi. La monŝanĝistoj baldaŭ rifuzis la roman

monon. Oni revenis al varinterŝanĝo. La ŝtato mem ricevis la impoŝtojn pere de varoj. La mizero kreskis; la ŝtato estis devigata disdoni tritikon al multaj malriĉuloj. En 211-217 okazis galopanta inflacio (tute simila al tiu, kiun konis Germanujo kaj Aŭstrujo, post la unua mondmilito). Estis terura periodo dum kiu ruiniĝis politikaj institucioj kaj la Roma Civilizacio.

Post ruiniĝo de la Roma Imperio kaj post la Barbaraj Invado, Eŭropo revenis al la plej primitiva Ekonomio; ne plu estis urba vivo. Industrio kaj mona cirkulado estis haltigitaj. La feŭda farmo, la vilaĝo, la monaĥejo kontentigis siajn proprajn bezonojn. Denove varinterŝanĝo funkciis praktike sen mono. En la Alta Mezepoko ĝi ne estis pli utila ol hodiaŭ en sovaĝa arbaro. La raraj or-moneroj stampitaj de la Merovidaj reĝoj aŭ kiuj cikluladis post la reformo de Charlemagne en 781, iĝis kolektoobjektoj, kiuj kuŝis en la trezoroj religiaj aŭ laikaj. Ili pasis en alian manon okaze de heredo aŭ edziĝo; ili iĝis juveloj; pli rare la nobeloj uzis ilin okaze de gravaj transakcioj. Charlemagne stampis arĝentan denaron: 12 denaroj egalvaloris unu « solidus » (soldo - groŝo), kiu iĝis pfenigo en Germanujo kaj penco en Britujo. La ordinarnaj homoj malfacile ilin akceptis kaj Charlemagne faris, en 794, ordonon, por ke oni ĝin ne rifuzu.

Necesis jarcentoj antaŭ ol komerco kaj industrio renaskiĝu kaj ke mono refariĝu interŝanĝo-rimedo.

Sed baldaŭ denaro malaperis.

En la X-a jarcento la suverenoj koncedis stamprajton al nobeloj laikaj kaj religiaj, kiuj, ili mem, fiksis la enhavon de la altvalora metalo en la moneroj. Ju pli la suverena potenco estis malforta, despli multaj estis la mon-farejoj. Kelkaj, pro honesteco de la mon-faristoj, ĝuis certan prestiĝon. La pfenigo de Kolonjo estis disakceptita, ankaŭ la Viena ŝilingo. Sed la plej multe el la mon-faristoj vidis ĉi tie nur okazon por riĉiĝi. Tiucele ekzistis diversaj manieroj. Unu el ili estis elkurzigado de la moneroj. En la 12-a jarcento estis kutimo, ĉiujare, ŝanĝi la refiguraĵon de la denaroj, soldoj, pfenigoj; kaj deklari senvaloraj la antaŭajn monerojn. Tiuj ĉi, interŝanĝitaj kontraŭ la novaj perdis 25 % de sia valoro. Oni ankaŭ povis malpliigi la pezon de la moneroj; ili iĝis tiel maldikaj, ke oni povis ilin stampi nur sur unu flanko; ili estis la « braktea-oj » (braktea = maldika metalo). Oni malpliigis la kvanton de la altvalora metalo. Tiu kvanto variis laŭ la produktado de la minejoj.

La devaluto iĝis galopanta kaj baldaŭ en Aŭstrio, en Stirio, en Bavario, la ŝilingo entenis nur kupron; ĉiu provis pasigi tiun monon al siaj najbaroj; oni plej rapide kiel eble pagis siajn ŝuldojn; oni ion ajn aĉetis. En 1460 oni triviale ĝin nomis « la putraĵo ».

En Francio, la reĝo Philippe le Bel, pro siaj devalutoj, reputaciis kiel mono-falsisto. De 1226, pro la Krucaj Militiroj, Saint Louis kreis la « gros tournois ». Iom post

iom, ĝi maldikiĝis kaj finiĝis kiel kupra mono. La Francaj reĝoj sincere konsideris tiujn manipuladojn Kronan privilegion. Ili jetis la respondecon de la monkrizoj sur la financistojn, kiujn, de tempo al tempo, oni pendumis. Tial Enguerrand inaŭguris la pendumilon, kiun li estis stariginta en Montfaucon.

Por definitive forpeli la Anglojn ekster Francujo, fine de la Cent-Jara Milito, Charles VII bezonis multan monon. Emisiante devalutitan monon, Jacques Cœur financis parton de tiuj bezonoj. Kiam la inflacio montriĝis tro ĝena, la reĝo nomis Komisionon. La Komisionistoj akuzis la financiston, kun malagrablaj konsekvencoj por tiu ĉi. Jacques Cœur estis enkarcerigita. Li sukcesis forfuĝi al Romo.

En Britujo, en la komenco de la 16-a jarcento, devaluto okazigis plikariĝon, mizeron por la kampuloj kaj la laboristoj kaj multajn ribelojn. En Germanujo, la Germanaj princoj preparis la 30-Jaran Militon; ili devalutis la groŝon. Tio okazigis enorman monan cirkuladon; kiel ĉiam la inflacio, unue, estis favora al produkto, al komerco, al la konsumantoj. Baldaŭ okazis plikariĝo. La sekvoj estis teruraj; oni ilin komparis al pesto. Okazis ribeloj, disrabadoj, kaj, en kelkaj lokoj, reveno al varinterŝanĝo.

Mistiko de Oro

De la 14-a jarcento la internacia trafiko prefere kalkulis per oro, (la arĝentaj moneroj ofte estis falsaj). Oro estis simbolo de stabileco kaj potenco. En Eŭropo oro estis malmulta sed Mezoriento havis grandajn rezerveojn da ĝi, devenintaj el Hindujo kaj el Arabaj landoj. Florenco kaj Venecio, la unuaj, grandkvante stampis orajn florenojn kaj zekinojn, kiuj kurzis en Francio, Germanio, Britujo, kaj Ruslando. La serĉado de oro fariĝis ĉefa; la alkemiistoj provis ĝin sinteze produkti. En Mezepoko la reĝoj de Aŭstrio, Britujo, Francio, Saksujo kaj Pollando ligis al si alkemiistojn. La serĉado de la orfara ŝtono glutis riĉaĵojn. De la fabela metalo oni atendis riĉecon, sannon, junecon. Neniu alkemiisto sukcesis trovi la sekreton de la transmutacio de la metaloj. Sed tiu tuta eksperimentado estis la bazo de la moderna kemio. Unu el la rezultatoj estis, en Dresden, fare de J.-F. Böttger (1689-1719) la fabrikado de la porcelano. En tiu tempo naskiĝis la Meissen-manufakturo.

Oro-riverego : Post la malkovro de Centra Ameriko fare de la Hispanoj neelĉerpebla oro-riverego ŝutiĝis en Hispanion. Per ŝtelo, trompo, torturo, perforta laboro, oni eltiris el la Indianoj ĉiam pli da oro kaj arĝento. La konkerantoj sendis Hispanujon tutajn flotojn ŝarĝitajn je oro. La kaperistoj postkuris tiujn galionojn. Unu el la plej famaj estis Francis Drake (1540-1596), kiu ilin forkaperis, profite al Britujo. Tiu or-alfluo en Hispanujon kaj en la aliajn landojn pro komerco kaj militoj, senvalorigis la monon, kaj okazigis plikariĝon de la varoj.

Naskiĝo de bank-biletoj

Meze de Mezepoko pliigo de la komerco kun malproksimaj landoj kreis denove la problemon pri distancaj pagoj.

Ŝanĝistoj, bankistoj, kambioj iĝis nepre necesaj, kiel en la Babilona tempo. Aperis ĝirpagoj pere de pluraj bankoj. Ili estis la unua formo de niaj ĝirĉekoj. Pli poste aperis la tratoj.

Historio de la bank-biletoj komenciĝis en Ĉinio multe pli antaŭe ol en Eŭropo. En Eŭropo la unuaj ekzempleroj de paper-mono estis emisiitaj en 1483, de la Majoro, kiu estris la Hispanan fortreson en Alhama, sieĝata de la Maŭroj. Poste la biletoj emisiitaj en Nederlando dum la ribelo kontraŭ la Hispanaj okupantoj. Tio, kio plej mirigas la mon-historiistojn estas la mon-papero, kiun oni uzis en la Franca Kanado en la 17-a jarcento. En 1685 la Kanado-ŝtatestro vane atendis monon el la reĝo de Francujo, Louis XV, kiu havis pli urĝajn zorgojn. La trupo ne plu ricevis soldon; ĉar la komerco dependis precipe de la elspezoj de la soldatoj, la ŝtatestro prenis originalan decidon. Li rekviziis ĉiujn ludkartojn, multajn ĉe la soldatoj, li ilin kvaronigis kaj skribigis sur ĉiu parto monan valoron. Li subskribis ĉiun pecon kaj tiu sistemo funkciis ĝis proksimume 1750.

En 1664 Svedujo, elĉerpita de la 30-Jara Milito, havis nur bronzan monon, kiu estis ege peza. La plej dika monero pezis 19 kg. 700!

La Londonaj negocistoj kutimis deponi siajn or-kaj-arĝentajn rezerveojn en la Londona Turo, en kiu ankaŭ troviĝis la Kronaj trezoroj el altvaloraj metaloj. Tiu citadelo, komencita sub Vilelmo la Konkeranto, staris malantaŭ muregoj kaj bastionoj. Elektita trupo, la « Beefeaters » vikle ĝin gardis. En 1640, kiam la Parlamento rifuzis al la reĝo Karlo la unua la militajn kreditojn, kiujn li postulis, li forprenis ĉiujn rezerveojn de la Turo. La negoto perdis enorman riĉaĵon.

De tiam estis necese trovi pli sekuran ŝirmejon. Oni elektis la fortan ĉambron de la orajistoj, kiuj, jam en Mezepoko servis kiel depono por la ŝanĝ-kaj-ĝirbankoj. Por ĉiu depono, la deponanto ricevis kvitancon je sia nomo. Sed ili estis ankoraŭ nomaj.

Pli ol unu jarcento estis necesa por ke ili iĝu veraj bank-biletoj, anonimaj kaj libere transsendeblaj.

Dum la sekvantaj jarcentoj, kelkaj monaj krizoj malriĉigis la popolojn, okazigis gravajn perturbojn.

Malgraŭ ĉiuj provoj por ilin malhelpi kaj por ekvilibrigi la internacian monan sistemon, la vorto de Henri Ford restas vera: « La homo, kiu solvos la mon-problemon multe pli faros por la homaro ol la plej grandaj militistaj strategiistoj el ĉiuj tempoj ».

Jam Kopernik (1473-1543), la granda astronomo, diris en sia Traktado pri mono: « La plej ofta kaŭzo, kiu perdigas al mono ĝian valoron, estas, ke oni ĝin emisias en tro granda kvanto ».


El la libro de Roland Nistsche
« La Mono »

Aŭtomobile veturi pere de suno : estas revo, kiu baldaŭ efektiviĝos

La monata belga ĵurnalo « Nova Tekniko », antaŭ nelonge, precizis la esplorojn kaj provojn efektivigitajn en la mondo pri la fama sunveturilo : estas revo por ĉiuj, kiuj pasiĝas pri motoroj, mekaniko kaj fikcio.

Paralele le estonta aŭtomobilo ricevos aŭtomatajn aranĝojn, kiuj ne nur helpos la veturiston sed alportos preskaŭ perfektan sekurecon.

La telegvidata aŭtomobilo kun aŭtomata pilotado estas por morgaŭ : kondukisto kaj paraĝeroj povos kartludi dum veturado je 100 km-hore ; ĉe enirejo de la aŭtovojo la aŭtomobilo estos transprenita de la pilotado-ejo, kun kiu la kondukisto daŭre interkomunikiĝos per radio ; sufiĉos, ke li indiku la deziratan direkton. Tratruta karto estas enigita en elektronikan cerbon, kiu efektiviĝos pilotadon kaj atentante la trafikon, certigos sekurecon.



Pli originala sistemo permesis, en USONO, kontentigajn provojn : Temas pri vera elektronika vojo ; neniam oni tuŝas la stir-radon. Sur la strato estas simpla blanka kontinua strio, kiun fikse rigardas elektra okulo fiksita sub la veturilo, ĵus super tiu blanka linio. Kaj tute sole tio rulas !

Alia formulo : oni enterigas metalan relon laŭ la akso sekvenda de la veturilo ; ĉe antaŭaĵo de tiu aŭto estas 2 « Kapoj », kiuj devas resti egaldistance de la relo ; laŭ la plej malgranda dekliniĝo tiuj « kapoj » funkciigas mekanismon, kiu influas la direktilon kaj rapide ĉion reordigas. Tiu tekniko unue aplikata al ŝarĝaŭtoj estos baldaŭ grandskale uzata.

Sed morgaŭ, kiaj estos niaj aŭtomobiloj ?

La rotacia motoro, kiu nuntempe furoras, estos baldaŭ superpaŝita de la turbino-motoro, kiu permesos 200 km-hore kaj eĉ plu ; ĝi ne plu nutros sin per benzino sed per solida karburajo sub formo de etaj grajnoj.

Nummomente tiuj mirindaj mekanikoj estas nur prototipoj : la « Fal-Stelo » de Albert Lory kaj la « Fajro-birdo » de « ĝeneral motors » : 225 ĉevaloj, 3.000 turnoj po minuto kaj pezo je 300 kg. La karoserio en stratumita poliesterezino portas en sia malantaŭaĵo drivilojn, kiuj firmigas stabilecon okaze de vento. La stirlado estas farita pere de unika leviero lokita inter la sidiloj ; kiam la kondukisto volas ripozi li ŝaltas ruĝan ŝaltilon ; tuj « aŭtomata ŝoforo » transprenas la deĵoron, kondiĉe ke la veturilo rulu sur elektronika strato ; tiam anteno eliras kaj laŭsekvas la kablون instalitan sub la voja tegaĵo kaj kiu estas trairita de bas-frekvenca kurento.

Kiun veturilon elekti ?

Jen la elektra aŭtomobilo kun brul-piloj, pri kiuj oni tiom multe parolis okaze de la Gemini-eksperimentoj, kaj kiuj baldaŭ funkcios : senfuma, silenta veturilo konsumante ne plu klasikan karburajon sed hidrogenon kaj oksigenon ; eĉ la inĝenieroj esperas uzi por tiuj motoroj la oksigenon de la ĉirkaŭanta aero.

Kun iom da pacienco ni vidos la atomajn aŭtomobilojn kun reaktoro lokita sub la malantaŭaj kotŝirmiloj ; ĝi permesos aŭtonomion 8-10.000 km.

Sed multe pli frue naskiĝos la sunaj veturiloj. Ili funkcios dank'al baterio konstituita el serio da platetoj el silicio lokita sub la kapoto ; frapitaj de la sun-radioj, tiuj platetoj fabrikos elektran kurenton. En Alger, antaŭ kelkaj jaroj suna motoro estis eksperimentita kun sukceso ; mallonga sukceso, ĉar nuboj kaj vojaj tuneloj neniam komprenis kial la veturilo haltis ĉe ilia proksimiĝo.

Por konkludi oni devas noti ankoraŭ, ke elektroniko transformos la reflektorojn en lampetojn, kiam veturilo, nokte, renkontos alian veturilon ; ankaŭ ĝi bremsos la aŭtomobilon, kiam nesekureco montriĝos grava ; kaj ĝi malfermos la pordojn de nia aŭtejo.

Ne estas revo : ĉio tio nune estas eksperimentita en laboratorioj kaj uzinoj.

DENASKA MARŝAMANTO

Mi naskiĝis en Ossun (Altaj Pireneoj) ; estas la lando de la kanto kaj de la marŝo. Miaj patrinaj geavoj, modestaj kaj admirindaj kamparanoj, al kiuj mi ĉion ŝuldas, devige multe marŝis ; iliaj kampoj kaj herbejoj situis en Ibos ; ili iris tien piede kun la falĉilo aŭ la rastilo sur la ŝultro ; mia avino, 90-jara, iris kaj reiris de Ossun al Ibos : 12 km en la tago.

Kiam mi naskiĝis, estis nur, vilaĝdialekte, nur unu krio : « Oh ! la bonno cametto » (Ho ! la bona gambeto !). Elirinte el la ventro de mia patrino mi havis surojn, kvazaŭ mi estus jam marŝinta longan marŝon. Tiu marŝon daŭris jam de 9 monatoj ; ĝi ankoraŭ daŭras.

Mi studis en la kolegio de Villeneuve-sur-Lot ; mi loĝis je 2 km. de tiu lernejo, en la ĉirkaŭurbo Eysses ; inter la urbo kaj tiu lernejo estis la senfina Eysses-avenuo, kiun ombris monumentaj platanoj. Mi piede kovris tiun distancon 4-foje ĉiutage ; marŝante sub tiuj platanoj, similaj al tiuj de kastelo-aleo, mi lernis, ne nur miajn lecionojn, kiujn mi ripetis en mia kapo, sed ankaŭ la poezion kaj la diversecon de la mondo. Mi revis sub tiuj centjaraj foliaroj, kiuj ŝajnis brui en la aero kun la akcento de Henri IV, ili instruis al mi majestecon kaj simplanimecon ; kompare kun ili, la aliaj arboj ŝajnis al mi pompaj, eĉ la kverko, kiu ne ŝercas aŭ la poplo, kiu levigas al si la kolon. Tiuj platanoj kontraŭe, ne konsideris sin seriozaj. Ili estis maljunaj sed ne premegis min per siaj lecionoj kaj konsiloj ; kun sia orita karno kaj siaj glazuritaj folioj, kiuj alegre glimis sub la suno, ili ŝajnis senĉese libertempi.

La cirkulado estis ankoraŭ humana, kaj ne delira kiel hodiaŭ ; de tempo al tempo aŭtomobilo venis renkonten al mi aŭ preterpasis min ; ĝi tiel malrapide veturis, ke mi vidis ĝin alveni de malproksime ; kaj mi havis sufiĉe da tempo por min flanken meti.

Kelkfoje mi havis grandan ĝojon : mi renkontis ĝendarmojn, kiuj iris ĉiam duope, kiel la feliĉaj paroj ; sur siaj grandaj ĉevaloj, trote, ili revenis de sia rondvizitado.

Mi marŝis meze de la avenuo kun la rigardo, kiu perdiĝis en la foliara volbo. Kelkfoje, por skandi mian marŝon, mi plengorĝe kantegis « Sub la bela ĉielo de la belaj Pireneoj ».

Iun tagon, surprizita, mi sentis leĝeran bruon, apenaŭ percepteblan glitadon ; estis mia patro, kiu, bicikle, silente, sekvis min ; amuzita, korduŝita, li aŭkultis tiun bubon, lian filon, kiu tiel fiere, tiel naive, forĵetis sian voĉon al ĉiuj eĥoj.

Tuj kiam li ŝtelume alvenis apud min, rigardante min kun tenera rideto, mi, konfuzita, silen-

tis. Nenion dirante li preterpasis min, esperante, ke lia silento kuraĝigos min al plua kantado. Kvankam ravita de lia tenereco, kiun mi profunde konsciis, mi sentis min iom ĝenata ; ĉu, eble, li juĝis min ridinda ? De tiam, neniam plu mi kantis sola en plenaero.

Laŭlonge de la Eysses-avenuo mi ankaŭ lernis ĝentilecon. Mia patro estis dirinta al mi : « ci salutas ĉiujn personojn, kiujn ci konas ». Nu, kiujn mi povus pli bone koni ol tiujn personojn, kiujn mi vidis 4-foje ĉiutage, suprenirante kaj malsuprenirante la Eysses-avenueon ? Per mia ĉapo, simila al mola drapo-kapsulo, kiu glitis de mia frunto sur mian nazon, mi do salutis maldekstren la pordiston de la kadukulejo ; fine de lia nazo, iĝinta diafana pro lia aĝo, ĉiam fajretis la guto de maljuna malvarmumo. Dekstren mi salutis Sinjorinon Camaret al kiu oni ĝus amputis mamon kaj kiun mi komparis al Amazono : nia grek-latino-profesoro estis ĝus dirinta al ni, ke la Amazonoj tranĉigis al si mamon por meti la balteon.

Maldekstren mi salutis la spiciston de la Kooperativo, kiu eligis antaŭ sian pordon, sur malgranda ĉareto, siajn barelojn da peklitaj sardinioj.

Dekstren mi salutis unu instruiston, kiu, por iri al sia lernejo, saltis sur sian biciklon, kiel rajdanto de Saumur sur sian Ĉevalon.

Senĉese mi salutis kaj resalutis : dekstren, maldekstren... maldekstren, dekstren... matene, tagmeze, posttagmeze, vespere.

Oni ne reciprokis mian saluton ! Oni ne vidis min !

Mi alvenis al la kolegio tute ellacigita, kun la manartiko rompita, same kiel okazas al Usono-Prezidento, kiu premis milojn da manoj dum invitakcepto en la Domo Blanka.

Laŭmezure kiel mi grandiĝis, mi malpli kaj malpli salutis. Tial la Villeneuve-anoj fine diris kun sia varma sudfranca akcento : « Li iĝis merda ! ».

el Paul Guth.



MALAPERERO

En la policejo

— Sinjoro Petro Marteno, jen tio, kion vi deklaris : « Mardon, la 12-a de junio, mi revenis hejmen, en mia proprietaĵo de Suzac, kie ni loĝas mia edzino kaj mi. Mi revenis el Parizo. Estis la 22-a. Mi tre miris, kiam mi konstatis, ke Agnesa, mia edzino, ne estis en la domo. Mi telefonis al kelkaj niaj amikoj, sen rezulto. Fine, maltrankviligita, je la 24-a horo mi iris al la ĝendarmejo por signali ŝian malaperon ».

Vi anoncis vin kiel komercan direktoron de la firmao Ferjak ; ŝajnas, ke vi estas multe pli en la Ferjak-establaĵoj. Vi estas edziĝinta kun Sinjorino, vidvino Ferjak, kiu heredis de sia unua edzo, Ludoviko Ferjak, la proprietaĵojn, la vinkelejojn, la vitejojn, la distilejojn. Via edziĝo okazis laŭ la kuneco-reĝimo ; tio igis vin heredanto de via edzino, precipe post la morto de ŝia unika filo Patriko Ferjak ; li mortis en aŭto-akcidento sur Pireneostrato. Tiam vi estis en Bruselo ; ni kontrolis. En la firmao Ferjak, S-ro Serano estas la ĝenerala direktoro ; li priresponzas la fabrikadon de la konjako ; estas vi, kiu direktas la vendadojn kaj la eksterajn rilatojn.

Oni diras, ke via firmao nune konas financajn malfacilaĵojn.

— Estas vere ; sed tiuj malfacilaĵoj ekzistis jam en la tempo de S-ro Ferjak. Krome, ni tute ne randas la katastrofon.

— Vi multe malpliigis vian personaron kaj okazas, ke viaj ĉekoj estas senvaloraj.

Alia afero. Kiamaniere povas vi klarigi la fakton, ke en tiu nokto de la 12-a de junio vi ne pensis pri la boato ? Estas la brigadisto Klemento, kiu la unua alportis tiun ideon.

— Mi vidas nenion por respondi ; mi ne pripensis ĝin, jen ĉio. Kaj tamen estas vere, la boato malaperis kaj la traserĉoj sur la oceano nenion sciigis al ni.

— Via boato, « La Mara Birdo », estas solida boato, longa je 6 m., kapabla elteni la altan maron, precipe en la kvietaj veteroj de tiu 12-a de junio. Kutime S-ino Marteno tre spertece kondukis tiun boaton ; ĉu ŝi estis bona naĝantino ?

— Agnesa estis bonega piloto kaj bonega naĝantino.

— Kaj vi, S-ro Marteno, ĉu vi estas bona naĝanto ?

— Mi ne komprenas la intereson de tiu demando.

— Komprenu, S-ro Marteno, la Justico devas decidi pri la malapero de via edzino kaj ekspliki ĝiajn kaŭzojn. Estas eble, ke murdo okazis kaj ke vi estas la murdinto...

(Dum la polico-komisaro ekzamenas mian dosieron mi jetas rigardon al mia brakhorloĝo ; mi jam sidadis ĉi tie dum 2 horoj kaj duono ; mi malkrucigas miajn gambojn,

kiuj komencas rigidiĝi. Mi bezonas fumi, mi ŝatus trinki alkoholon ; sed de unu monato mi lernis abstinecon).

— Jen ankoraŭ io : Kiel vi povas klarigi, ke S-ino Marteno kontraktis, je via profito, tiel fortan asekuron ?

— Ĝi estis subskribita en la unuaj tagoj de nia edziĝo ; ankaŭ mi kontraktis la saman por Agnesa ; certe la kvitancoj multe kostis, sed koncerne la fiskon, ili alportis al ni atentindan avantaĝon. Cetere, ĉi-momente ni pensis precipe al Patriko. Ni longe diskutis la aferon kun la agente de la kompanio ; li povos tion certigi al vi.

— Mardon, en la vespero, antaŭ ol reveni hejmen, vi haltis en la albergo « la Tri Ĉasistoj ». Vi telefonis al Parizo, ĉe S-ro Danielo Serano ; li forestis ; lia edzino Monika respondis ; ŝi estas multe pli juna ol sia edzo ; ŝi estis granda amikino de S-ino Marteno ; kaj oni diras, ke S-ro Serano estis tre asidua apud S-ino Ferjak antaŭ ol ŝi fariĝis via edzino.

— Agnesa parolis al mi pri tio. Cetere Danielo rapide konsoliĝis kun Monika.

— Ĉu vi pensas, ke via edzino havis amanton ?

— Mi tute ne kredas tion.

— Estas ĉio por hodiaŭ, S-ro Marteno.

(Mi revenas hejmen ; ĉio tio, hodiaŭ, tiom malmulte gravas ! Post kelkaj semajnoj la firmao Ferjak, Serano, la vilao de Suzac, estos nur foraj memorajoj ; mi havos vivon tute novan, kun virino tiel aŭdaca kiel mi. Kial oni diras, ke inter amo kaj mono oni devas elekti ? Mi, mi volas la du ambaŭ !)

Agnesa

Petro, mia karulo, mi atendas vin en tiu izolita farmo ; sed mi timas kaj mi ege bezonas vian ĉeeston. Tial mi repasigas sur la magnetofono tiun bandon, kiun mi devis nepre detruigi. Mi ne ĝin detruis ĉar mi ĉiam deziras aŭdi vian voĉon por min kuraĝigi ĝis via alveno ĉi tien.

Punkton post punkto mi sekvis la planon, kiun ni kune ellaboradis. Mia karulo ! kiom mi amegas vin ; mi devas ĝin kafesi ; mi amas vin pli ol mi amis mian karan Patrikon.

Mi ankoraŭ unufoje aŭskultu vian voĉon.
« Mia karulino, ne forgesu, ke ni decidis ŝanĝi nian vivon ; ĉar la firmao malprosperas estas necese foriri,

tre malproksimen, kun multe da mono, antaŭ ol ĝi tute fiaskos. Mi ĉion preparis. Bone aŭskultu :

Iru ĝis Talmont, kie estas nia boato. Metu la 2 CV en parkejon. Supreniru sur la boaton. Vi ne forgesis la plaĝo-sakon, en kiu estas la magnetofono. Kontrolu en la likimuna sako (ban-vestaĵo, peruko, vestoj, ŝlosiloj kaj legitimaĵoj de la Renault, pasporto, strat-karto Michelin, poŝlampo, mono, ŝlosiloj de la farmo).

Estu fidema, mia amatino ; ĉio bone okazos. Konduku la boaton ĝis Merchet, kie loĝas Danielo ; neniom timu : ili estas en Parizo. Prenu ilian barkon kaj alkröĉu ĝin al la boato. Reiru al la alta maro ; surmetu la banveston ; malkröĉu la barkon ; direktu la boaton al la plena oceano ; lanĉu ĝian motoron ; plonĝu kaj en kelkaj brustonaĝoj reatingu la barkon. Ne forgesu meti gantojn Revenu al Merchet ; metu aliajn vestojn ; ne forgesu la perukon. Reloku la barkon en ĝian propran lokon, ĉe Danielo. Iru ĝis la preĝej-placo, kie troviĝas la Renault ; la ŝlosiloj estas en via sako. Kontrolu la strat-mapon kaj la pasporton ; Vi estas nun Fraŭlino Sofia Garela de Lausanne (Svisujo). Vi libertempas en Francujo. Singardece veturu ; post 248 km. vi trovos kamparan vojeton ; trairu la arbareton. Jen la farmo. Vi havas la ŝlosilojn. Vi eniras. Vi kontrolas, ke la ŝtroj estas bone fermitaj. Metu la veturilon en la remizejon kaj... atendu min. Vi havas proviantojn. Mi alvenos iun nokton, ĉirkaŭ je la 23-a. Ne tro malpacientiĝu mia karulino. Ni baldaŭ estos kune kaj riĉaj. Sed, atentu, ne montru vin ekster la domo ».

— Jes, mia karulo, mi atendas.

En la Policejo

Sinjoro Marteno, ni trovis nenion. Ni estas devigataj konkludi, ke, pro mara akcidento, Sinjorino Marteno mortis kaj malaperis kun la boato.

Agnesa

Mia karulo, Petro, mi petas vin, venu ; mi pli kaj pli timas ; dum la nokto mi aŭdas glitadojn sur la muroj kaj la bestoj, kiuj hurlas en la arbaro. Mi eĉ ne kuraĝas lumigi la lampon. Tamen, mi volas ion konfesi al vi. Ne moku min : mi kunportis la dikan revolveron de Ludoviko. Mi firme tenas ĝin en mia mano ; mia poŝlampo estas en la alia. Mi sidas sen moviĝi. Mi ne plu volas malsupreniri al la kelo por ĵeti la rubojn en tiun fosajon,

kiun vi preparis por la mazut-kuvo ; ĝi terurigas min ; ĝi ŝajnas tomo.

Estas la 23-a. La vento forte frapas la ŝtrojn.

Aŭto-motora silentiĝas.

Mallumo, reflektoroj-mallumo, reflektoroj-mallumo, reflektoroj : **3-fojojn, kiel interkonsentite.** Kial ŝi ne respondas ?

Mi estingas la reflektorojn ; mi prenas la ŝlosilon kaj mian elektran lampon. Mia dekstra mano refermiĝas sur la aŭtomata pistolo. Mi eliras el la veturilo ; mi senbrue marŝas al la domo. Mi malfermas la pordon. Mi aldirektas la lumon antaŭ mi. Ŝi estas ĉi tie en obskureco kaj diras per mortanta voĉo : « Petro, ĉu estas vi ? Petro respondu min ! »

Mi liberigas la sekurbutonon, mi faras unu paŝon antaŭe. Agnesa subite stariĝas kaj prilumas min per sia lampo. La frakaso de la pafado konfuziĝas kun la nomo, kiun ŝi krias, kiam ŝi rekonas min : Monika !

Petro, en la vilao de Suzac

Estas pli ol la sepa ; de hieraŭ senĉese pluvas. Jam noktiĝas. Mi atendas sen malpacienco. Certe ŝi baldaŭ alvenos ; ŝi faros ĉi tie nur mallongan halton kaj tuj reiros al Merchet, kien ŝi devas alveni antaŭ la servitino. Antaŭ ŝia alveno ŝi devas ankoraŭ ŝanĝi siajn vestojn kaj lavigi la R-16. Danielo estas en Parizo ; cetere, li tute ne estas ĝenanta, li estas nenio ! Ja, mi dezirus okupiĝi pri ĉio, sed la policio verŝajne havas ankoraŭ unu okulon sur mi. Jen kial estas ŝi, kiu devis fini la laboron.

Mi aŭdas la bruon de la krado ; estas ŝi !

Ni gajnis, S-ro Komisararo. Vi mem deklaris mian edzinon morta.

Restis al ni nur ŝin mortigi !

Malsupre la enirpordo malfermiĝis kaj fermiĝis.

« Mi estas ĉi tie Monika ! supreniru, sed ne lumigu la lampon, oni ne devas vidi vin tra la fenestro ! »

Ŝi komencas supreniri la ŝtuparon.

« Venu mia amatino, venu, finfine ! »

Ŝi estas sur la lastaj ŝtupoj ; ŝia dekstra mano leviĝas ; ŝi celfrapas antaŭ ol atingi la koridoron. Mi falas, frapita ĉe la ventro. Tiam mi vidas ŝian vizaĝon : Agnesa ! !



POR VIA DISTRO

SOLVOJ DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Anagramoj

La trovotaj vortoj estis :

Unua serio : Genro, Greno, Negro, Regno.

Dua serio : Demonio, Monedo.

Tria serio : Merino, Rimeno.

Ŝak-enigmo

La frazoj kiuj estis kaŝitaj en la ŝak-tabulo de silaboj kaj kiujn oni trovis laŭ la movo de « ĉevalo », estas : Li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo. Naskiĝu, edziĝu kaj mortu, ĉiam monon alportu.

Dispecigitaj vortoj

La frazo de Zamenhof kiun oni povis rekonstrui dank'al la 14 donitaj vortetoj estis : Komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso.

Enigmoj

Per tiu enigmo, oni devis trovi la jenajn vortojn :

- 1) Barito - Bato
- 2) Fuliko - Fuko
- 3) Nababo - Nabo
- 4) Kodako - Koko
- 5) Butiko - Buko

Forigitaj ĉefliteroj

La trovotaj vortoj estis : Nukso, Etato, Kulo, Hurdo, Enui, Lano, Paso, Erao, Bato, Laso, Etero, Nulo, Etoso, Kuko, Kupro, Orelo, Nodo, Suro, Irido, Lago, Eposo, Balo, Laro, Eruko.

Per la trovitaj ĉefliteroj oni povis kontrui la jenan frazon ; nek helpeble, nek konsileble.

NOVA PROBLEMO (proponita de S-ro Salasc)

Krucvortoj

	A	B	C	D	E	F	G	H	I	J	K
1					■		■				
2				■				■			
3			■						■		
4		■								■	
5	■										■
6											
7	■										■
8		■								■	
9			■						■		
10				■				■			
11					■		■				

(R) signifas : nur radiko.

Horizontale

1. Detala tabelo (R) ; Celtrafo (R). — 2. Aro da du samspecaj objektoj (R) ; Aperturo en tegmento (R) ; Seksa sufikso. — 3. Multvalora metalo (R) ; Mortiga infekta malsano ; Fonetike : ronda elstarajo ĉirkaŭ kolono. — 4. Fabela estaĵo. — 5. Alta herbo el familio de gramenacoj (R) ; Por ĝin havi necesas kokino. — 6. Scienco pri la regado de la aŭtomataj organismoj. — 7. Nombro ; Participa finaĵo. — 8. Japana poemeto (R). — 9. Pronomo ; malhelpi ĉian komunikon ; Peceto (R). — 10. Papago (R) ; Motiĝo de iu loko al alia ; Ege. — 11. Sakforma provizejo por konservi grenon ; Muzikilo (R).

Vertikale

A. Rakonta poezio (R) ; Korta naĝbirdo (R). — B. Pezo de ĉiu speco envolvo (R) ; Tuŝi per la lipoj (R) ; Moviĝi al iu loko. — C. Grupo, amaso (R) ; Fantazia rakonto (R) ; Ĉiu ekstrema parto de heliko (R). — D. Filo de la filo (R). — E. Varmega elfluaĵo el vulkano (R) ; Utiligi. — F. Administranto de provinco. — G. Demanda pronomo por neŭtraĵoj ; Vegetaĵo kies rezino estas laksiga (R). — H. Participa finaĵo. — I. Interjekcio esprimanta malestimon ; Peni ne renkonti iun ; Loka adverbo (R). — J. Participa finaĵo (R) ; De numeralo ; Tempokalkulo (R). — K. Centro de sangocirkulado ; Kapti ion (R).

GRAMATIKO PER BONHUMORO

AR — ER : SUBSTANTIVAJ SUFIKSOJ

DIFINO (P.V.) — **LR** (10 - 24 - 48)

AR (Kolekto) estas kontraŭa al **ER** (fragmento).

Kun substantivaj kaj verbaj radikoj : (arbaro - demandaro) - (neĝero - stebero).

Radika uzado : arigi dokumentojn - diserigi panpecojn - ĉe tiaj temperaturoj, la materio diseriĝas.

RIMARKOJ

AR : por esprimi nur okazan kolektivon, oni simple diras : Aro da, kelke da, grupo da, multe da

— li ellernis aron da vortoj (ne vortaron)

— tie kuŝas aro da dehakitaj arboj (ne tuta arbaro).

ER : oni prefere uzas pli precizajn vortojn : (parto, peco, guto, floko, atomo).



Malagrabra situacio

Mi petas vin, rapidu ! Mi tute ne plu povas kontroli mian senmovecon. Tiuj guteroj eniras en miajn manikojn, glitas laŭlonge de miaj brakoj kaj ĉie tiklas min !



Eleganteco

— Ŝajnas al mi, ke io mankas al la harmonio de tiu ĉapelo. Tiuj papilioj povas ĉi tien ariĝi nur pro ĉeesto de floroj, ĉu ne ?

— Ho, Sinjorino, vi mem estas florbukedo, kiu ilin allogas.



Konsekvenco

Kompreneble, vi ankoraŭ tion ĉi ne tuj bezonos. Tamen estu antaŭzorgemaj ; estonteco rapide venos. Profitu la rabataĵon por aĉeti la bebo-vestaron.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (66 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux. BARCHON, Lg. (120 fr.).

Britujo : S-ro John Rapley, 156, Wanstead Park Rd., ILFORD, Essex IGI 3 TP, ĝiro 50 292 3008 (140 p.).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (20 kr.).

Finnlando : S-ro Jussi Jäntti, Esperantotie 4, SF 02220 IRISLAHTI (13 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (9,3 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1º, la, BARCELONO (170 pes.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Affieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532.

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (900 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (48 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk. 209721 (9 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveien 143-B, LJAN (18 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, al. Valea Rosie 4, ap. 69, B.P. 8/4 BUKURESTI - 66.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (13 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (11 fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (4 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (4 dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (18 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo